# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (877) • 2009 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



Orgenkoncerto dum la kongreso en Vroclavo

**KELI**

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**



**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR



Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| La Espero | 75 |
| Raporto pri la 19-a Ekumena kongreso en Vroclavo | 81 |
| Kongresbildoj | 86 |
| Personaj impresoj de la Ekumena Esperanta Kongreso | 87 |
| Ami kaj agi fidante | 88 |
| Nomo | 92 |
| Informetoj | 94 |
| Matenpreĝo dum la EEK | 95 |
| Mia deziro | 96 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Espereble vi, same kiel mi kaj mia familio, havis eblecon partopreni en kongreso dum la somero kaj revenis plena da nova energio kaj kun belaj memoroj. Kiam mi enpaĝigis la jenan numeron, mi trarigardis multajn fotojn kaj la belaj memoroj fortiĝis. Bedaŭrinde ne estas loko por publikigi ĉiujn fotojn.

Mi esperas ke la raporto, la artikoloj kaj la bildoj, kiujn vi trovos en la nuna kaj sekvontaj numeroj, iom povas transdoni la grandfamilian kaj agrablan etoson kiun ni spertis en la ekumena kongreso en Pollando. Pli ol ducent partoprenantoj, kelkaj konataj vizaĝoj, kelkaj novaj, kaj ni ĉiuj havas la saman bazan kredon kaj povas plejofte kune partopreni en preĝoj kaj diservoj.

Se vi partoprenis en iu alia kunveno, mi volonte publikigos viajn impresojn por ke ni povu partigi inter ni, niajn travivaĵojn.

# La espero

## Prelego dum la ekumena kongreso en Wroclaw, 2009

Philippe Cousson, FR

Mi volas danki al tiuj, kiuj petis min enkonduki la temon por ĉi tiu kongreso, ĉar ĝi postulis de mi tre interesan laboron kaj pripensadon. Mi esperas ke ankaŭ vi profitos el tio.

Ĝi estas temo multflanka, kaj trovi ordon por prelego ne estis evidenta. Mi esperas ke mi estos sufiĉe klara por vi, se jam por mi.

Mi volas noti ke tiun temon elektis ankaŭ la Eŭropa Kunveno de la KEK, la Konferenco de la Eŭropaj Eklezioj, la kontinenta organizo de la ne rom-katolikaj eklezioj, kunveno kiu okazas ĉimonate en Liono, Francio. La temo de tiu kunveno estas precize: Vokitaj en unu espero. Mi ankaŭ konsultis la preparajn dokumentojn de tiu kunveno. Tio estos ankaŭ nia maniero kvazaŭ partopreni en ĝi.

> ni devas konstati ke ne Dio rompis la dialogon, sed la homo kiu kaŝis sin

Kiam oni parolas pri espero, oni preskaŭ neniam demandas sin: kiu esperas? Evidente mi, evidente la homo. Sed ni devas pensi pli foren. Pro kio ni povas esperi?

Pro kio en la historio pritraktita de la Biblio esperas la popolo de Izrael? Pro



tio ke Dio esperas. Dio estas tiu kiu unua esperas. Li esperas en la mondo, kiun li kreis. Li esperas en la homo kiun li kreis. Li esperas en Abraham kiun li vokis. Li esperas en la popolo kiun li elirigis el Egiptio. Sed samtempe, li ne ĉesis esperi en la homo ĝenerale.

De tiu espero do fontas nia espero.

Se ni bone studas kaj komprenas la rakonton pri Adam kaj Eva, kaj pri la falo, ni devas konstati ke ne Dio rompis la dialogon, sed la homo kiu kaŝis sin, kaj ankaŭ unua sin maskis per folioj.

Depost tiu epizodo, Dio serĉas denove la kontakton kun la homoj, por komprenigi al ili sian esperon. Dio ne volas prezenti siajn postulojn, sed siajn esperojn.

Dio ne estas tiu potenculo, kiu per fortaj manifestiĝoj, devigus la homojn akcepti lin kiel superulo, al kiu nepre oni devus submetiĝi, ĉar neniel eblas ali-

maniere. Dio ne estas tiu terurulo, kiun pro ne kontesteblaj aperoj oni devus dolĉigi. Dio ne estas tiu alta diaĵo, kiun oni devas regule viziti en specifaj lokoj kaj tempoj, ĉar ni bezonus tion por plaĉi al li.

Dio ne estas tiu, kiu volas manifesti sian nesupereblan forton, sed li estas tiu kiu volas revelacii, riveli, diri, paroli, anonci sian nevenkeblan esperon.

Kompreneble kaj la amo de Dio al la mondo kaj la espero de Dio al la mondo ambaŭ apartenas al la naturo de Dio. Antaŭ kelkaj jaroj mi parolis pri la amo. Hodiaŭ mi parolas pri la espero.

Kion do celas la revelacio de Dio? Ke la homo komprenus ke Dio esperas en tiu mem kiu ricevas la mesaĝon. Tiu revelacio estas la sola maniero, kiun oni havas por ekkoni Dion. Per la naturo, oni eble povas ekvidi kelkajn aspektojn de la Kreinto, sed certe ne koni lin, certe ne ekhavi kontakton kun li.

> Kompreneble kaj la amo de Dio al la mondo kaj la espero de Dio al la mon-do ambaŭ apartenas al la naturo de Dio

Ni povas koni Dion nur pro la fakto ke li malkaŝis sin al ni mem, agante en ni, asertas teologo.

Tiu revelacio de Dio situas en la kadro de historio. Dio parolas al la homoj en iliaj tiutempaj kondiĉoj, kulturoj, komprenoj. Dio eĉ uzas ilin por doni tute malsaman mesaĝon ol kion ili kunhavas. Dio akceptas iamaniere enkarniĝi en la kulturon de la homo, kiam li parolas. Tio estas kaj ŝanco, kaj risko. Dio ne liveras revelacion definitivan, validan por ĉiu tempo, ĝis venis li mem, en Jesuo Kristo. Eĉ post tiu veno, post la kruco kaj la releviĝo, Dio daŭre parolas, predikas, anoncas al la homoj pri sia espero, uzante la atestojn de la kredantoj, uzante la kulturon kaj komprenon de la aŭskultanto. Dio volas diri sian esperon al ĉiu en ties propra esto nuna.

Tiun revelacion li sigelis per alianco. Kaj tion eĉ plurfoje. Li aliancis kun Adam, kun Kain. Jes, relegu. Li aliancis, pli formale, kun Noah. Li aliancis ankaŭ kun Abraham, ripete. Ankaŭ kun Isaak, kun Jakob. Li aliancis kun Moseo, kaj kun la popolo de Izrael. Kaj ankaŭ kun la profetoj. Ĝis fine la nova alianco estis evidentigita en la kruco kaj la releviĝo.

Tiun aliancon, tiun revelacion, li formulis per promesoj. Tiu promeso, kiu sigelas la esperon kaj amon de Dio, estas LA ĉefa elemento de la naturo de Dio, kiun ni devas koni. Dio ne devigas nin ion fari, li devigas sin ion fari. Rigardu ekzemple, kiamaniere Moseo dialogas kun Dio, kontestas kun Dio en la epizodo de la ora bovido. Li diras al Dio: "sed vi promesis". Kaj Dio agnoskas, kaj agas laŭe.

Tiu naturo de Dio estas la forta apogilo por la kredanto. neniu alia apogilo estas utila por la kredanto. Nenio alia validas. Neniu ago niaflanka havas valoron por nia espero, krom la promesoj de Dio. Ni devas do serĉi tiujn promesojn, preni ilin por ni, kaj vivi el ili, konsekvence de ili. Nia nura merito

estas la promesoj de Dio.

En la epizodo kun Abraham kaj la dispecigitaj bestoj, Dio volis doni garantiaĵojn al Abraham en la tiutempaj kutimoj. Ĉiam Dio volas uzi la homan kulturon por liveri sian mesaĝon, por signifi sian promeson. Nur Dio pasis inter la duonaj partoj de la kadavroj. Nur Dio sin engaĝis. En la rakonto pri li, Ijob asertas: Mi scias ke mia Liberigonto vivas. Fido kaj espero lin savis.

Kaj la plej firma kaj lasta garantiaĵo, kiun li lasis al ni, estas Jesuo Kristo. Jesuo, kiu venis sur la teron, Dio venanta vivi inter la homoj, meze de la homaj kondiĉoj kaj kulturo. Kristo, kiun la homoj mortigis sur kruco, kaj kiun Dio relevis la trian tagon. Tiu releviĝo estas garantiaĵo ankaŭ al nia espero. Kaj tiun garantiaĵon signis ankaŭ la veno de la Spirito en la tago de Pentekosto. Pro la releviĝo, kristanismo estas religio de espero, kaj ne religio de timanta submetiĝo.

Ĉar Jesuo estas multe pli ol la tradicia bildo de simpla majstro de saĝeco. Li estas tiu, kiu kontestas kun la homoj kaj atestas pri la espero de Dio, konfirmas kaj firmigas ĝin.

Ĉar Dio esperas, kaj ĉar Dio revelacias tiun esperon, ni povas esperi. Sen la espero, Abraham ne povus preĝi por Sodom, por sia nevo Lot.

En la hispana lingvo, la verbo "esperar" signifas: esperi, kaj ankaŭ atendi. Esperi estas atendi ion, kio ankoraŭ ne estas ĉi tie, kun certeco, kiel diras la epistolo al la Hebreoj.

La manifestiĝo de la dieco de Dio dependas de la reala plenumiĝo de la promeso, kiu pruvos la fidelecon kaj diecon de Dio.

La serĉo de tia feliĉo ne estas vivo per espero, ne estas vivo en promesoj, ĝi estas malpacienco, kiu ne toleras atendi la satiĝon

Tiu, kiu ne plu atendas, kiu ne plu esperas en la vivo, tiu falas en malesperon, kaj eĉ demisias. Tiu ne konas la esperon. La malfeliĉo venas el la demisio, el la malespero, el la ĉeso de atendado. La malfeliĉo ne venas el la peko tiom, kiom ĝi venas el malespero.

La nuntempa klopodado estas por nuna, tuja feliĉo. La serĉo de tia feliĉo ne estas vivo per espero, ne estas vivo en promesoj, ĝi estas malpacienco, kiu ne toleras atendi la satiĝon.

Estas kelkaj bildoj por kunligi esperon kaj atendon. Konata estas tiu de la homo, kiu plantas arbon. Planti arbon ne alportos tujan repagon. Sed arbo estas promeso de posta plenumiĝo. Estas en la franca tre bela rakonto de Jean Giono: la homo kiu plantis arbojn. Mi ne scias, ĉu ekzistas tradukoj en tiu aŭ alia lingvo. En la Biblio estas tiu bildo. Kiam Jerusalemo estas sieĝata, baldaŭ prenota, la profeto Jeremia formale aĉetas kampon. Ĉu tio ne estas signo de espero? Signo ke la nuna situacio ne estas la fino de ĉio.

Espero estas atendado, deziro kaj strebo por paco, harmonio, plibono por ĉiu, por la aliulo. Ĝi ne estas strebo por tuja ricevo de nuna feliĉo.

Sed inverse, kiam la celo, la strebo troviĝas antaŭe, tiam la nuno ricevas parton ankaŭ de la antaŭvidata plenumiĝo. Espero kaj pacienco efektiviĝas ankaŭ nune. Fakte la espero estas tre realisma, ĉar ĝi kalkulas kiel seriozajn la eblecojn de la realo. Ĝi ne fantazias, sed serĉas konstrui sur firma reala bazo. Tio, kion ni esperas, estas la realo kiu venas.

Kion do esperas la kristanoj? Kion serĉas la kristana fido? La kristana fido atendas la estonton de la mondo. La kristana fido ne forkuras el la mondo, ĝi serĉas ĝian estonton. Same kiel la mondo mem atendas, sopiras, kiel diras la epistolo al la Romanoj. Se la homo ĉiam estas rapidema, Dio ne estas tia.

Por Dio, fakte, nenio estas definitiva. Dio rifuzas konkludi. Dio ĉiam daŭre esperas. Kaj kiel diras la Psalmoj: Mia espero estas al vi. Kaj ankaŭ: Neniu el tiuj kiuj esperas al vi hontiĝos. La espero utilas por kontraŭstari tion, kio ne fartas bone en ni, kaj ĉirkaŭ ni.

La savo de la homo ne estos la rezulto de la pieco. Ĝi estos la rezulto de la promeso de Dio. La plej grava biblia versiklo, laŭ mia kompreno, estas tiu: Johano 3:16: *Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian solenaskitan filon, por ke ĉiu kiu kredas al li ne pereu sed havu eternan vivon*.

La fonto de nia fido, kaj de nia espero troviĝas en tio, en la promeso de Dio kiun li revelaciis al ni, en lia alianco al kiu li vokas nin.

Kion atendi? Certe la releviĝon. Certe ankaŭ le revenon de Kristo. Certe la plenumiĝon de la lastaj ĉapitroj de la Apokalipso de Johano. Certe la ĉeeston kun Dio poreterne. Pri la espero de releviĝo, simple memoru la konsolparolojn de Paŭlo al la Tesalonikanoj.

La reveno de Kristo estas espero de ĉiu kristano, sed ĝi estas ankaŭ la espero de la kristano por la tuta homaro. Ni ne devas forgesi, ke la eterna ĉeesto de Dio kun ni kaj reciproke komenciĝas ekde nun.

Por Dio, fakte, nenio estas definitiva. Dio rifuzas konkludi. Dio ĉiam daŭre esperas.

Ĉar fakte, kiel diris Tereza el Lisieux, ni ne esperas, ne atendas malpli ol Dion mem. Kaj kiel signo kaj konfirmo de la promeso, ni devas kompreni ke tiu espero konkretiĝas ankaŭ nun. Dio estas eterne ĉeestanta, tio signifas, ankaŭ nune.

Vi memoru la rakonton en libro de Daniel pri la tri junuloj en la ardanta forno. Trapaŝi la ardantan fornon eblas ĉar Dio ĉeestas kaj kunpaŝas.

La espero eblas por la homoj, ĉar Dio mem esperas. La ekzisto de Dio estas la plej granda espero por la homaro. La nekredantoj ne konscias ke la nekredo kondukas al foresto de la espero. Se estas nenio ekster la homo, nenio ekster la homa kondiĉo kaj preter ĝi, kion esperi? Kiel esperi?

Dio troviĝas ĉe la fonto de nia espero, kaj ankaŭ ĉe la fino kaj celo de nia espero. Ĉar Dio esperas en la homo,

esperas en ni ĉiuj persone, ni povas esperi en Li.

Tion Dio volas malkaŝi, revelacii al la homoj, ekde longa tempo, kaj ankaŭ nun pere de siaj atestantoj, ke li havas esperon en la homo kaj la mondo. Ni ricevis rolon en tio. Parto de tiu espero estas por ni atesti pri tiu espero, kiu revivigis nin kaj vivigas nin, kaj tion ni esperas kaj Dio esperas, tiu espero povas vivigi la aŭdantojn. Tiu promeso ligas la homon al la estonteco, kaj liberigas lin el la pasinteco. Ĝi permesas ke la malnovaj aferoj pasu, kaj ke ĉio fariĝu nova.

> La nekredantoj ne konscias ke la nekredo kondukas al foresto de la espero.

Nun, mi deziras antaŭ ol mi konkludas, komenti por vi unu versiklon el la epistolo al la Romanoj, Romanoj 15:13, versiklo ofte uzata kiel bendiro fine de Diservo: *Kaj la Dio de espero plenigu vin per ĉia ĝojo kaj paco en kredado, por ke vi abunde havu esperon, laŭ la potenco de la Sankta Spirito.*

Diversaj elementoj por noti:

Unue – la Dio de espero. Ne simple Dio, sed Dio kvalifikita, karakterizita: la Dio de espero. Tio signifas ke Li estas LA Dio de espero, ke la aliaj dioj ne estas tiaj, neniel povas esti dioj de espero. Ĉiuj niaj nuntempaj idoloj, dioj, ne kapablas esti aŭ fariĝi dioj de espero. Tio estas specifa karaktero de kristana fido, ankaŭ de la juda, havi Dion de espero.

Krome, se Li estas la Dio de espero, tio signifas ke ne ekzistas espero krom ĉe Li. Ĉiu alia espero estas ŝajna, kvazaŭa, falsa, surogata.

Due – vin plenigu. Plenigi, tio estas komplete, ĝis rando, komplete plena. En aliaj kutimaj bendiroj, oni aŭdas la paron graco kaj paco. Ĉi tie estas ĝojo kaj paco. Sed, nun estas preskaŭ la samo. Simpla vortludo en la greka: ĝojo estas *khara*, kharas kiam la graco estas kharis, kharitis. La ĝojo nia, kantata de la epistolo al la Filipianoj, estas la rezulto de la graco ricevita de Dio per Kristo, tiu ĉi ĝojo plenigas nin. Kaj estas ankaŭ vortludo, ĉifoje en la hebrea, kiam plenigi, kompletigi kaj paco estas preskaŭ samaj: *shalom*. Ĉio troviĝas en la donaco de la espero: ĝojo kun graco, pleneco kun paco.

Tiu kiu ricevas tiun esperon, donitan de Dio, donacitan de la Dio de espero, ricevas gracon kaj pacon, ĝojon kaj plenecon. Kaj tiam okazas la abundeco poste indikita. La verbo tradukita per "abunde havu" enhavas prefikson kaj radikon: *peri*: ĉirkaŭ, plie, kaj *seuô*, ekiri, lanĉi, puŝi, ekmovi, postkuri. Ne temas nur pri abundeco, kio ja estas pli ol pleniĝo, sed temas pri moviĝo, pri superrandiĝo, pri elfluo.

La espero de Dio superrandiĝas, superfluas nin, ni ne povas gardi ĝin por ni solaj, ni ne povas enteni ĝin ene de ni, sammaniere kiel ni ne povas reteni la gracon, la pacon, la ĝojon, la plenecon, kiu verŝiĝas el de ni al aliaj. Kaj tiu fenomeno ne estas el nia fonto, el nia

strebado, ĝi devenas de la Spirito, de Dio. Tio estas la potenco de la Spirito, la dinamika potenco de la Spirito.

Traduki la vorton "espero" ŝajnas al vi facila. Tamen ekzemple en la franca estas du malsamaj vortoj. Kaj en kelkaj lingvoj, ĝi tutsimple ne ekzistas. En la hinduisma mondo, ĉio estas cikla, ĉio revenas, kiel montras la simbolo de la rado. El tiu rado, nenio estas atendinda, atendebla, neniu espero.

Sed ankaŭ en nia moderna mondo, iame kristana, ne plu ekzistas espero. Nun estas krizoj, ekonomia krizo, ekologia krizo, loĝiga krizo, migra krizo, malsata krizo. La kristana horizonto ne plu valoras en la socio ĝenerale. La marksisma horizonto kolapsis. Liberalismo same, naciismo, same. Niaj samtempuloj nun batalas, strebas por vivi tagon post tago, por ĝui tagon post tago. Futuro? Neniu futuro. Oni zorgas pri la nuno kaj nenion plu atendas de la futuro.

Sed la kristanoj esperas, atendas, firme apogitaj sur la promesoj de Dio, sur la verko de Jesuo Kristo, krucumita kaj releviĝinta. Alia futuro ne eblas.

El Dio, el la Dio de espero, el la potenco de la Sankta Spirito, ni ĉion ricevas, ĝojon kaj gracon, kaj plenecon kaj pacon. La Gloro kaj la Regno de Dio komenciĝas jam nun, kaj daŭras ĝis la plenumiĝo de la tempoj. Mi asertas al vi: Per tiu graco, per tiu promeso, per tiu potenco: Jes ni povas, ĉar ni vivas el la beno de Dio, la fonto de nia espero.

Mi do konkludas simple per tiu bendiro: *Kaj la Dio de espero plenigu vin per ĉia ĝojo kaj paco en kredado, por ke vi abunde havu esperon, laŭ la potenco de la Sankta Spirito*.

**Konsultitaj dokumentoj:**


Bro, B. (1980) *Contre toute espérance,* Paris: Cerf

Geense, A., Mottu, H. (1996) *Oecuménisme et universalisme: propos d'un théologien européen,* (Publications de la Faculté de théologie de l'Université de Genève , no 19) Genève: Labor et fides.

Patterson, B. (1989) *Waiting: Finding Hope when God Seems Silent* , Downers Grove, InterVarsity Press.

Briend, J. (2007) *Avant Jésus, l'espérance,* (Jésus et Jésus-Christ, 93 ) - 1 vol. Paris: Mame-Desclée,.

Moltmann, J. (1978) *Théologie de l'espérance: Essai sur les fondements et les conséquences d'une eschatologie chrétienne.* Paris: Cerf.

la diversaj dokumentoj de la Kunveno de KEK en Lyon, julio 2009, http://assembly.ceceurope.org/index.php?id=118&L=2

# Raporto

## pri la 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso

(62-a de IKUE 59-a de KELI)

Raportas Vera TUINDER-DEKKER, NL

Sabaton la 18-an de julio la kongresanoj estis bonvenigataj en la granda porpastra seminario sur ĉarma insulo en la rivero Odro, meze de la urbo Vroclavo en Pollando.

Post la enskribado ni ricevis belan ĉambron, kie ni en- kaj eliradis dum tuta semajno. En nia kongresa sako ni trovis libreton, bele ilustritan kaj de netaksebla valoro!

Dum la vespermanĝo servis al ni afablaj, helpemaj porpastraj studentoj. Ili ĉiam ĉeestis dum ĉiuj manĝmomentoj.

Vespere ni kolektiĝis en la kapelo por la inaŭgura ekumena diservo. Jacques Tuinder elokvente faris paroladon pri "La Espero".

**Dimanĉe** ni estis dividitaj, sed tamen invititaj. La Evangelia diservo okazis en la evangelia-luterana preĝejo de Dia Providenco (2). Post longa promenado ni atingis la preĝejon. La luterana episkopo kuncelebris. Philippe Cousson predikis pri la kongresa temo: kredo, espero kaj amo. Ni ĉiuj estis invititaj al la Sankta Manĝo. Ni grupiĝis ĉirkaŭ la altaro por dividi panon kaj vinon.

Poste ni rapidis al la solena sankta meso en la preĝejo de La Plejsankta Virgulino Maria sur Sablo gvidita de multaj pastroj kaj unu diakono.

Posttagmeze okazis la solena malfermo de la kongreso en "AULA LEOPOLDINA" en la Vroclava universitato. Belega baroka konstruaĵo.

Multaj gravuloj salutis kaj longe parolis polalingve. Kantisto kaj violonistino briligis la kunvenon.

Vespere ni ĝuis kulturan programon. Koncertis Jadwiga Dziegielewska. Ĉiumatene okazis sankta meso. Antaŭe preĝo de rozario.

**Lundo**. La matenpreĝon prizorgis Jacques kaj Vera Tuinder. La temo estis "vi estas mia amata filo".

Kun la matenmanĝo en la stomako ni



1



2

kantis duonan horon, sub gvido de sac. Bernard Eichkorn kaj Stefan Lepping.

Philippe Cousson havis la honoron enkonduki nin en la temon de la kongreso. Pri kiu ni esperas?

Tuj poste prof. Boĵidar Leonov prelegis pri Fido, Espero kaj Amo en la konceptoj, agoj kaj la vivo de la ortodoksuloj. Tre ekumene li parolis pri mirakloj.

Streĉante niajn piedojn ni iris al la ortodoksa preĝejo de s-taj Cirilo kaj Metodo por la tagmeza preĝo. Tie bele, basvoĉe, kantis la popo.

La nelacigebla Zdzislawa Kazmierczak gvidis nin laŭlonge de la vidindaĵoj de sia urbo Vroclavo. Multe pluvis, tamen multon ni vidis.

Vespere grek-katolika pastro Bogdan Drozd (3) regalis nin pri religiaj poeziaj kantoj. Li montris tre personan stilon kun multaj decibeloj.

La vespero havis surprizon. Ni ŝipveturis sur la Odro sed bedaŭrinde pluvis; ni ĝuus la lumigitajn konstruaĵojn apudriverajn (1), sed la atmosfero sur la boato estis tre gaja kaj invitis al interkonatiĝo (bildoj sur paĝo 87).

**Mardo**. Matenpreĝis kun ni Bernard Eichkorn. Ni kantis gregoriane laŭdojn. sac. Roman Forycki (4) prelegis pri espero al la mondo laŭ vidpunkto de la papo Benedikto la Deksesa.

Sekvis prelego de prof. Endre Dudich: *Tero, ĉielo kaj espero – Geologio kaj teologio.* Temis pri Biblio, scienco, Darvino. Espero ne al si mem sed al Dio. Tre interese. Li finis sian prelegon citante 'La Sunkanton de Francisko'.

Tagmeza preĝo okazis en la katolika preĝejo de La Plej Sankta Nomo de Jesuo. Jesuitoj konstruis ĝin; ĝi nun funkcias kiel porstudenta preĝejo.

Samuel Gaillard reference al psalmo 23 rakontis impresplene pri sia filino Priscill, kiel ŝi malsaniĝis kaj feliĉe resaniĝis. Ŝi volonte venus kun la patro al la kongreso, sed bedaŭrinde la kuracisto malkonsilis.

Je la tria horo prof. Endre Dudich prelegis pri *Ami kaj agi vidante*. Patrino Tereza kaj Albert Schweitzer: muziko, medicino, mistiko.

Kultura programo sekvis. Orgenkoncerto de Ernst Leuze en la evangelia


3


4

-luterana preĝejo. Multaj homoj aŭskultis la eminentan ludadon de la muziko de Bach, Händel, Mendelssohn k.a. (frontpaĝo)

Vespere denove ni gustumis vokalistan recitalon de Pavel kaj Wladyslaw Salik kaj Antoni Walaszek kun akompano de Wojciech Lawnikowicz (12).

Vesperpreĝon prizorgis sac. Atilla Szép. Ni multe kantis laŭ taizea rito.

**Merkredo**. Tuttaga ekskurso.
Je la naŭa horo kvar aŭtobusoj atendis nin por servi al kvar kategorioj: la poloj, la eksterlandanoj, la malbonirantoj, kaj mi ne memoras kiuj ankoraŭ kunvojaĝis.

Ni veturis unue al Swidnica, kie ni vizitis evangelian lignan 'Preĝejon de Paco' (7). Ĉi tie ni preĝis ekumene, kaj Ernst Leuze mallonge orgenkoncertis por ni.

Sankta meso en la katolika katedralo kaj forveturo al Ksiaz. Malsatuloj jam formanĝis la enhavon el la ricevitaj mansaketoj. Por tagmanĝo (5), je 16.00a horo, oni regalis nin en la kuracloko Szczawno Zdroj. Ekstere en la brila suno ni aŭdis




koncerton (6). Ni iomete rondiris, manĝis glaciaĵon (10) kaj serĉis kaj finfine trovis la memorŝtonon (11) kun la nomo de L.L.Zamenhof. Fariĝis tre sukcesa, valora, sed laciga ekskursa tago.

**Jaŭdo**. Matene preĝis kun ni Stefan Lepping. Li parolis pri la Sankta Spirito.

Ĝenerala kunveno de IKUE kaj samtempe jarkunveno de KELI. En la KELI kunveno Ágnes malkaŝis la venontjaran kongreslokon. Danke al la hungaroj ni kongresos en 2010 en alloga eklezia konferencejo 'sepstela' en Beregdaróc.

Ekumenan tagmezan preĝon prezentis Janos Kirsch helpe de la filino kaj la edzino.








La plej multaj kongrespartoprenantoj
Fotis Wil van Ganswijk-Vlasbom

Vizito al la impresplena panoramo prezentanta parton de sanga historio de Pollando, kaj rondiro tra la insulo. Solena sankta meso en la katedralo. Samtempe Evangelia Diservo kun Sankta Manĝo en la preĝejo de s-ta Kristoforo.

Vespere ni ĝuis la entuziasman muzikiston, amuziston Jo Mo.

Malfrue finiĝis ĉi tiu programero, Jacques kaj Vera tamen kondukis la mallongigitan vesperpreĝon. Marko 10, 46-52. Nur kelkaj homoj ĉeestis.

**Vendredo**. Ekumenan matenpreĝon gvidis Roman Forycki: unueco de Dio, kaj danko.

Prelegis Siegfried Krüger pri Bonhoeffer kaj la Ekumeno. Li parolis pri la vivo kaj pensoj pri tiu promilita martiro. Fine li montris foton de la tomboŝtono de Adolf Burckhardt; ni kantis numeron



8



9



490 el ADORU.

Sekvis la prezentado fare de Maria Beloševič pri *Sankta Francisko: paco kaj bono*. Ŝi montris lumbildojn pri la kunveno de franciskanoj el 65 landoj. Ili festis la 800 jaran ekziston de sia komunumo. "Oni povis vidi ke ili ekzistas"! Poste Milos Šváček parolis pri pasintjaraj aranĝoj. i.a. pri la honorigo per meritkruco al pastro Eichkorn.

Norbert Südland prizorgis la tagmezan preĝon en la grek-katolika preĝejo de sanktaj Vincento kaj Jakobo. Li elektis la psalmojn 100 kaj 119.

Libera posttagmezo. Mi vizitis la botanikan ĝardenon tuj apud la kongresejo. Tiom da floroj kaj arboj! Vere ĝuinde.

Philippe Cousson gvidis la solenan vesperan preĝon kun dankesprimoj kaj komuna beno.

La adiaŭa vespero estis en la lertaj kaj humoreskaj manoj de Carlo Sarandrea (8). Pasis poemoj, kantoj, anekdotoj, gimnastikaĵoj (9) por instigi ambaŭ cerbopartojn al kunlaboro. Carlo sprite monologis pri diversaj historiaj centjariĝoj en Esperantujo. Ambaŭ prezidantoj per donacetoj dankis al la LKK-anoj kaj aliaj meritplenaj kongresanoj.

**Sabato**. La matenan preĝon kongresferman gvidis Siegfried kaj Jacques pri la temo *Danko kaj beno*.

Impresplena estis la meditaĵo de Jacques kiam li citis Henri Nouwen pri *Kio estas beno?*

Tuj poste Philippe fermis oficiale la kongreson.

La kongreson modele organizis kaj zorge akompanis tre diligenta LKK. Resume, ĝi ofertis al ni riĉan programon pro kio ni varme dankas. Pri multaj kontribuoj ni volonte legos en nia revuo Dia Regno. ☙

10





Ruth kaj André ludas

11





Memorŝtono



Grek-katolika preĝejo




Ruth van Puijenbroek,
Ágnes Ráczkevy kaj André



Siegfried Krüger
kaj St Kristoforo

12 - Muzika vespero






Karl Heinz Schäffer
kaj Irén Bagi

# Ŝipveturo


Teresa Pomorska


Vera kaj Jaques Tuinder


Sigfried Krüger, Szép Attila, Carlo Sarandrea

## Mallonga persona impreso de mi pri la kongreso:

En Vroclavo okazis ĉi-jare la Ekumena Kongreso kun 230 partoprenantoj. La semajno plaĉis al mi. La kongreso estis ĉefe en unu konstruaĵo en kiu preskaŭ ĉiuj partoprenantoj gastloĝis kaj kie ni komune manĝis. Ni vizitis multajn diversspecajn preĝejojn, dise en la urbo kaj havis en ili preĝmomentojn kaj diservojn. Ĉiam gravaj estas dum kongreso la jarkunvenoj.

Estis urbekskurso kaj tuttaga ekskurso al tri malgrandaj urboj. En Vroclavo oni povis viziti belegan botanikan ĝardenon, grandan panoramon, grimpi en turon (parte per lifto) kaj partopreni en ŝipveturado vespere sur la rivero Odro. Estis kelkaj prelegoj inter aliaj pri Bonhoeffer kaj Francisko de Asizo. Ni aŭskultis multe da muziko kaj dum la adiaŭa vespero estis diversaj agrablaj prezentaĵoj de la partoprenantoj. Kio tre plaĉis al mi estis la renkonto kun amikoj el diversaj landoj. Tia amikeco ekestas kaj kreskas kiam oni regule ĉeestas kongresojn. Sekvontjare estos kristana kongreso inter la 2-a kaj la 9-a de aŭgusto en Beregdaroc, en la oriento de Hungario, en bela nova konstruaĵo kun naĝejo!
"Ĉu ankaŭ vi ĉeestos?" oni demandis al mi. "Tre volonte, se eblos!"

*Wil van Ganswijk-Vlasblom*

# Ami kaj agi fidante

## Parto 1 - Albert Schweitzer

Endre DUDICH, HU

Amo sen agoj estas trompo, aŭ almenaŭ mem-trompa iluzio. Amo ne bezonas reciprokecon. Ago ne bezonas "favorajn cirkonstancojn". Sed ambaŭ nepre bezonas fidon. Fidon, malgraŭ ĉiuj "normalaj", "raciaj" konsideroj.

Ni elvoku hodiaŭ la vivon kaj agadon de du grandaj personoj de la 20-a jc, kiuj amis senkondiĉe kaj agis senhezite. Mi konscie kaj intence elektis unu viron kaj unu virinon, unu protestanton kaj unu katolikinon – ambaŭ ne-hungarojn. [la dua parto pri Patrino Tereza venos en sekvonta numero /red]

**Albert Schweitzer – muziko, medicino, mistiko**
(Kaysersberg 1875 – Lambarene 1965)

"Esti homo malfacilas, sed esti io alia ne indas".

Albert Schweitzer naskiĝis la 14-an de januaro 1875 en eta germana vilaĝo de Rejnlando, Kaysersberg. Lia patro, Ludwig Schweitzer, estis luterana pastoro tie, kiel ankaŭ jam lia patro. Albert havis tri fratinojn kaj unu fraton. Duonjare post lia naskiĝo la familio transloĝiĝis en alian vilaĝeton, Gunsbach, proksime al urbo Münster, kie li komencis la "realan" mezlernejon. Lia gepatra lingvo estis la alsaca dialekto de la germana lingvo.

Krom la profesio de pastoro ankaŭ la pasia praktiko de muziko estis familia tradicio. Albert estis kvin-jara, kiam li eklernis ludi fortepianon, kaj kvar jarojn poste, orgenludadon. La instruisto estis Eugen Münch.

Fininte la mezlernejon en Mulhouse, en la jaro 1893 Albert veturis Parizon, kie vivis lia onklo, por lerni artan orgenludadon. Lia instruanto kaj majstro estis Charles-Marie Widor. Poste li studis teologion kaj filozofion krom en la fama Sorbono en Parizo ankaŭ en la universitato de Strasburgo, kaj iĝis pastoro de la tiea preĝejo Sankta Nikolao.

En 1899 Albert Schweitzer doktoriĝis pri filozofio en la prestiĝa universitato de Tübingen. La doktoran disertaĵon li verkis pri "La religia filozofio de I. Kant." Indas citi kelkajn bazajn tezojn de Kant, ĉar ili evidente forte kaj daŭre influis la mondkoncepton de Schweitzer.

- Ne la kredo devas esti bazita sur la religio, sed la religio sur la kredo.
- Mi serĉas en la Evangelio ne la fundamenton de mia fido, sed ties konfirmon.
- Oni devas servi al Dio kun gaja koro, ne pro perforto.

Kant firme asertis, ke la tri nemalhaveblaj kondiĉoj de la morala konduto estas

- La libereco de volo,
- La senmorteco de la animo, kaj
- La ekzisto de Dio.

Kant ne rigardis tiujn esti racie pruveblaj veroj, sed kiel praktikaj postuloj. Krom Kant, li plej alte estimis la stoikan filozofion.

La titolo de lia doktora disertaĵo pri teologio estis "La Mesiismo kaj la mistero de la pasio. Skizo de la vivo de Jesuo." Tübingen 1901.

En 1902 Albert Schweitzer iĝis privatdocento de la Teologia Fakultato de la Strasburga Universitato.

En 1904 – denove en Parizo – Albert legis varbantan flugfolion de la Luterana Misia Societo. Li decidis iĝi kuracisto, por helpi la suferantajn homfratojn. Li tuj ekagis, kaj studis medicinon ekde 1905 ĝis 1911, kun speciala atento al la tropikaj malsanoj.

La pasion por orgeno li konservis por sia tuta vivo. Li ne nur ludis, sed ankaŭ konstruis orgenojn, kaj skribis manlibron pri la reguloj de orgen-konstruado. Krome li eĉ verkis pri muziko. Lia libro "J.S.Bach, la lejpciga majstro", aperinta unue en la franca lingvo en 1903, poste – pliampleksite – en la germana lingvo en 1908 akiris al li multajn admirantojn.



Schweitzer verkis ankaŭ pri teologio kaj filozofio.: "Historio de esploroj pri la vivo de Jesuo"(1906), kaj "La mistiko de apostolo Paŭlo (1911), ktp. Tiujn karakterizas protestanta liberalismo, kiu regis en la universitato de Tübingen. La kristanismon li komprenis kiel la religion de la Amo. Li verkis ankaŭ komparan studon. "La kristanismo kaj la mondreligioj" (1924).

La decida turnopunkto de la vivo de Albert Schweitzer okazis en 1903. Li edziĝis al Helene Bresslau, jud-devena fraŭlino, flegistino. Ŝi estis filino de la rektoro de la strasburga universitato. Ili kune veturis al centra Afriko. Sed tute ne temis pri ekzotika nupto-vojaĝo.

En vilaĝo Lambarene (Gabono), sur duoninsulo de la rivero Ogouoé (la vorto Lambaréné signifas – tre trafe –: "ni provu!") Schweitzer fondis kaj organizis malsanulejon, por prizorgi, flegi kaj kiel eble kuraci la malriĉajn, eĉ nenihavajn nigrulojn, apartenantaj al 12 diversaj triboj. La malsanulejon li propramane konstruis „rande de la praarbaro", kiel indikas la titolo de unu el siaj verkoj.La motivo estas prezentita en la titolo de alia verko de Schweitzer: "Respekto al la vivo." (Ehrfurcht vor dem Leben).

Denove resonas la "universala morala leĝo" de Kant: "Agu tiel, ke vi ĉiam respektu la dignecon de la homeco, en via persono kaj en la persono de ĉiu aliulo".

Fakte tio, en plilarĝiĝita formo, estis la ĉefa devizo de lia vivo. Li skribis. *"La homo estas nur tiam morala, se li konsideras sankta ne nur sian propran*

*vivon, sed ankaŭ tiun de la plantoj kaj animaloj same kiel de la homoj, kaj strebas doni helpon al ĉiu suferanta vivulo.*" Li estas unu el la pioniroj kaj propagandistoj de animal-protektado. Li skribis: *"La etiko koncernas ne nur la homojn, sed ankaŭ la bestojn. Tiu procezo en Eŭropo komenciĝis kun Sankta Fancisko de Asiso... Estas klare: por kompreni ke la animaloj havas animon, antaŭ ĉio estas bezonate ke ni mem havu animon."*

Al la Societo de Misiistoj Schweitzer devis promesi, ke li praktikos nur medicinon, kaj ne predikos pri religio – ĉar la kompetentuloj timis pro liaj sendube ne-ortodoksaj opinioj.


Jozefo Azoawanié estis lia unua nigrulo-helpanto kaj interpretisto. Li diris al la doktoro, kiam oni mokis pri li: "Oni konsideras vin idioto sur la tero, sed certe ne en la ĉielo".

La unua mondmilito draste malbonigis la eĉ sen tio sufiĉe malfacilan situacion. Schweitzer estis germana civitano, kaj Gabono tiam estis franca kolonio. Do la instancoj en 1915 malpermesis al Schweitzer praktiki medicinon, kaj fakte internigis lin. Sed ili ne kontentiĝis pri tio. En 1917 la francaj aŭtoritatoj sendis lin kaj la edzinon en Francion. Tie oni internigis ilin en la eksa monaĥejo de Garaison en la Pireneoj, poste fermis ilin en tendaron de militkaptitoj(!) en Saint Rémy. Nur en 1918 ili ricevis permeson returni sin al la vilaĝo Gunsbach, en kadro de franca-germana interŝanĝo de militkaptitoj. Sekvintjare, en 1919, tie naskiĝis ilia filino Rena.

Sekve de la packontrakto de Versailles (1920) Alsaco-Lotaringio pasis de Germanio al Francio. Albert Schweitzer vole-nevole iĝis franca civitano. Li ekhavis postenon de helpkuracisto en la urba hospitalo de Strasbourg (jam ne Straßburg). Krome li servis denove ankaŭ kiel pastoro en la preĝejo Sankta Nikolao.

Estas rimarkinde, ke en 1924 la universitato de Zuriko (Svislando) elektis lin Honora Doktoro. (Poste tion faris ankaŭ pluraj aliaj universitatoj, inter ili tiu de Oksfordo.) Li nelacigeble rondvojaĝis en Eŭropo, komencante en Upsalo, Svedio, prelegante kaj donante orgenkoncertojn. La tiel "gajnitan" (perlaboritan) konsiderindan monsumon li investis al la Lambarene projekto.

En 1924 la geedzoj Schweitzer



revojaĝis al Lambarene, kaj restis tie ĝis 1948, do dudek kvar jarojn. El tiu periodo estas liaj "Leteroj el Lambarene".

Li plilarĝigis la hospitalon. Ĝi iĝis kapabla ricevi kaj prizorgi plurajn milojn da malsanuloj, inter ili 300 leprulojn en aparta setlejeto. Ekde 1925 venis kunlabori pluraj junaj doktoroj. Inter ili estis du hungaroj: László Goldschmidt kaj Richard Friedmann. Grava estis ankaŭ la helpo de sindonemaj flegistinoj: Mathilde Kottmann, Emma Hausknecht kaj aliaj. Pli poste liaj sekvintoj proprakoste konstruis hospitalojn en la Filipinoj, Burmo, Brazilo, Haitio kaj Peruo.

Siajn ideojn kaj spertojn Schweitzer priskribis en du verkoj: "Kulturo kaj etiko" (1923), kaj "Mia vivo, miaj pensoj". En 1952, post kiam li ricevis la kavaliran krucon de la Ordeno de Honoro, kaj estis elektita membro de la Franca Akademio de Sciencoj, li prezentis grandan prelegon en la Franca Akademio de Sciencoj: "La doktrino pri la respekto al la vivo". Temas pri la problemo de etiko en la pluevoluo de la homa pensado. (Tio estas legebla ankaŭ en esperanto, 37 p., eld. Klubo Esperantista de Malmö, Svedio).

En 1953, Albert Schweitzer ricevis la Nobel-premion pri paco. Sed nur en la sekvinta jaro li sukcesis vojaĝi al Oslo, por transpreni ĝin. Tiam komencis pluvi sur lin distingoj kaj donacoj. Schweitzer fervore aktivis kontraŭ la atombombo, la mondon minacanta danĝero de ĉion neniiga nuklea milito ("Alvoko al la homaro", Oslo 1957) Li klare formulis la alternativon: "Friede oder Atomkrieg", Paco aŭ nuklea milito (Novjorko 1958). Travivinte du mondmilitojn, li gardis sian firman idealismon: "surbaze de miaj konoj mi estas pesimisto, sed laŭ mia volo kaj mia espero – optimisto."

A.Schweitzer ne kontentiĝis pri la ideoj de la eŭropa filozofio. Li eĉ verkis studon pri la mondkoncepto de la hindiaj saĝuloj (1935). El tie fontas la jam menciita principo: respekti ĉian vivon, ne nur la homan. Tio estas fakte la malnova hindia koncepto de ahimsa, "ne-damaĝi", praktikata en la plej severa kaj konsekvenca formo de la adeptoj de la ĵainismo, malpli strikte de la budhistoj.

Helene forpasis en 1957, kaj Albert sekvis ŝin ok jarojn poste, en 1965. Ili ripozas, laŭ sia deziro, en la tombejo de Lambarene. Lian ĉerkon faris liaj prizorgitaj lepruloj.

La ŝtatprezidento de la jam sendependa Gabono skribe ekskuzis sin ke ne povas persone ĉeesti je la entombigo de Schweitzer. Lia reprezentanto nomis lin la "plej respektinda, tutmonde plej estimata, kaj plej aĝa civitano de Gabono."

Notindas, ke la bantu-nigruloj nomis lin en la galoa lingvo Oganga, la Granda Blanka Sorĉisto. Prave: ĉar li estis



muzikisto, kuracisto kaj spirita gvidanto en unu persono, kiel la “ŝamanoj” de la “primitivaj” homaj komunumoj en la tuta mondo. Tute logike: ili okupiĝas pri la tuta estaĵo homo, konsistanta el korpo, animo kaj spirito. (Aŭ: korpo kaj spiritnatura animo.)

Oni nomis lin “la konscio de la 20-a jarcento.” Iuj eĉ konsideras, ke li estis protestanta sanktulo. Ekzemple László Németh fama hungara verkisto, skribis pri li jene. *“Albert Schweitzer estas sanktulo en la moderna senco, kun kiu estis honoro vivi sur la sama terglobo kaj aparteni al la sama homaro.”* Kaj Lajos Áprily, hungara poeto, sopiris tiel:

*Lin, la simplan, la grandan mi vidis,*
*Parolis li saĝe – sed forlasis nin.*
*Nun mi demandas: ĉu v i meritis,*
*Homaro, ĉu ni meritis lin?*

Aliaj, male, obstine emfazas ke “li tute ne estis sanktulo”. Tiuj riproĉas al Schweitzer, ke li – onidire – traktis la nigrulojn kiel mense handikapulojn. Li mem diris: “ili estas miaj gefratoj, jes. Sed miaj pli junaj gefratoj.” Iuj teologoj opinias, ke pro liaj ne-tradiciaj opinioj li tute ne povas esti konsiderata kristano.

Li mem diris: *Anstataŭ proklami ke mi kredas je la en mi ekzistanta Dio, mi provas tiel agi, ke mia vivo kaj laboro mem parolu pri tio, pri kio mi kredas.”* Krome: *“Heroo de agado ne ekzistas. Oni povas iĝi heroo nur en la rezigno, en la sufero.*”

La definitiva prijuĝo estas la kompetenteco de la Sinjoro, en kies nomo Albert Schweitzer kun profunda fido kaj sindonemo agadis. Kaj estas skribite: *“...ni scias, ke por tiuj, kiuj amas Dion, ĉio kunlaboras por la bono.”* (Rom 8,28) Kaj Jesuo diris tre klare: “*Kion vi faris al unu el ĉi tiuj niaj fratoj la plej malgrandaj, tion vi faris al mi”.* (Mat 25,40)

---

En mia patrujo, Hungario, Albert Schweitzer havas buston en Budapeŝto, hospitalo portas lian nomon en urbo Hatvan, kaj eĉ altnivela kamera orkestro adoptis lian nomon. Ankaŭ Kalvinana Hejmo de Pensiuloj estas nomita pri li, kaj eĉ Societo de Muzikterapio. ☙

# Nomo

Mu Binghua, Ĉinio

Antaŭ longe, estis lernanto, nomita *Havi Krimon*. Kiam iu majstro lin adoptis, li havis la lakton ankoraŭ sur siaj lipoj, kaj li estis orfo. En sia infanaĝo, kiam aliaj vokis lin laŭ lia nomo Havi Krimon, li jesis ĝoje, kvankam tiam li ne povis klarigi, kiu donis al li tian nomon. Li kreskis tagon post tago kaj fariĝis knabo. Fine li komprenis la signifon de la vorto “krimo”. Do ĉiufoje kiam iu nomis lin Havi Krimon, li ne plu ĝojis, sed sentis sin aparte ĝenata. Kvazaŭ li denaske havus neeldireblan krimon, kiu similus al nigra nubo lin vualanta.

Iutage, finfine li sin kuraĝigis, venis

al la majstro kaj petis lin ŝanĝi lian nomon. La junulo plendis, ke lia nuna nomo neniel montras bonan aŭguron, des pli, efektive tiu nomo ofte antaŭ publiko faras lin humilaĉa.

Tion aŭdinte, la majstro ridetis, dirante: "Infano, iru vojaĝi diversloken, se survoje vi aŭdos kontentigan nomon, diru ĝin al mi kaj mi certe denove nomos vin laŭ ĝi."

La lernanto Havi Krimon tuj turisme ekvojaĝis. Li iris de vilaĝo al vilaĝo, alvenis ĉirkaŭaĵon de iu urbo kaj hazarde renkontiĝis kun aro da homoj, kiuj estis akompanantaj ĉerkveturilon al tombejo. Post demando la junulo eksciis, ke la nomo de la mortinto estas *Vivi Longe*. Estis strange al li, ke la aĝo de la mortinto ne atingis 30 jarojn, sed forpasis jam! Unu el la parencoj de la mortinto vole-nevole veis kaj diris:" Ĉu kun "Vivi Longe", ĉu sen "Vivi Longe", ĉiuj mortos senescepte.

Sekve, li eniris en la urbon. De malproksime li vidis, ke mezaĝa viro forte kaptis maljunulon. La oldulo aspektis tre kompatinda. Haste Havi Krimon antaŭenkuris por admoni kaj laŭte demandis: "Kial vi ne pardonas eĉ la kadukulon?" La viro respondis: "Li prenis prunte de mi monon, sed ne redonas." La maljunulo humile petis: "Mi ne estas 'ne voli redoni', sed vere mi havas neniom da mono por ŝuldoforigo." Havi Krimon plue pridemandis: "Kio via nomo estas?" La maljunulo diris: "Mi nomiĝas *Posedi Riĉon.* Havi Krimon eksplodis en ridon pro lia nomo, murmurante: "Vi posedas riĉaĵon, kion via nomo aludas. Sed kial vi tamen nun malhavas iom da mono?!" Li almozdonis al la maljunulo kelkajn monerojn kaj daŭrigis sian vojon.

La junulo Havi Krimon daŭrigis sian rondvojaĝon. Unu tagon, li venis al loko loĝata de urbanoj, kie estis multaj stratoj interkruciĝaj. Ĉe iu kruciĝo li rimarkis, ke homo gape staras tie, rigardante jen tien, jen tien ĉi. Havi Krimon alpaŝis lin kaj demandis: "Kion vi serĉas?" La demandito, kvazaŭ trovinte savanton, sincere sin prezentas: "Ho, bona homo, mi perdis la ĝustan vojon. Mi venis tien ĉi por viziti mian parencon, sed nun mi vere ne scias, al kiu direkto mi devas turni min." Kiel vi nomiĝas?" demandis Havi Krimon. Tiu diris:" Mi nomiĝas *Vojmontristo*. Sinjoro, bonvolu montri al mi la ĝustan vojon." Havi dubante diris: "He, vi, Vojmontristo! Kial vi ne kapablas eviti vojerari al vi mem?" Li donis al la homo ian helpon kaj afable adiaŭis lin.

La sekvantan tagon, Havi Krimon elveturis la malnovan urbon kaj rekte reiris al la majstro. Li rakontis al li pri sia tuta travojaĝo. Ridante, la majstro diris: "Do vi nun ankoraŭ intencas ŝanĝi vian nomon, ĉu?" Havi Krimon diris: "Majstro, ne necesas. Estas bone, ke mi, via lernanto, restas kun la antaŭa nomo. "La majstro kapjesis, dirante: "Via nomo ne rilatas al viaj agoj. Kiel vi povas havi krimon, se vi ne krimas? Ĉu jes?!"

[laŭ vortaro la ĉina nomigado estis sufice komplika afero kaj la nomo inter alie posedis la nevideblan sorton /red]

# Informetoj

Korekto

al **Espero Katolika** 1-3/2009


Albrecht Kronenberger, kiu kompilis la specialan kajeron de Espero Katolika *Kantoj post ADORU*, informas pri tri eraroj. Li skribas:

**Numero 12**:
Bedaŭrinde mi ne atentis, ke en la plurvoĉa versio estas sub la notoj nur unu strofo (kompare al du en la unuvoĉa versio). Jen la mankanta 2-a strofo:
[en numero 5/2006 la kanto estas komplete publikigita, red]

2. Ĉar Vi obeis
ĝis la ekstrema sort',
morto surkruca,
konas ni venkon,
scias pri grandpotenc',
konas ni Dion.

**Numero 35**, 2-strofo, linio 1:
per bonaĝ' >
per bonaĵ'

**Numero 41**, 1-a strofo, linio 4:
la elpelintojn >
la elpelitojn



En la ĉiutaga programo havis firman lokon la Matena preĝo, Tagmeza preĝo kaj Vespera preĝo.

Sabate la 25-an, estis la adiaŭa tago kaj la tiama matena preĝo estis la lasta. Transprenis ĝin Jacques Tuinder, NL kaj Siegfried Krüger, DE.

ADORU 120, Li vekas min matene ...
Psalmo 100, La dankpsalmo
Matena preĝo kun aldonitaj dankstrofoj
ADORU 120 5, La matena Beno de Martin Luther
Pensoj pri beno
ADORU 907, Dio benu vin ...

Sekvas la aldonitaj dankstrofoj:

Bona Dio, mi dankas al Vi, ke vi vokis min al ĉi tiu urbo, kie ni tutan semajnon kolektiĝis sub la sankta signo de l'espero.

Bona Dio, mi dankas al Vi, ke vi helpis al nia tre diligenta loka kongresa komitato regali nin per programo riĉa, varia, kultura kaj sekve ĉiel kontentiga. Mi dankas ankaŭ pro la belege eldonita kongresa libro.

Bona Dio, mi dankas al Vi, ke dum ĉi tiu semajno ni aŭdis pri veraj viaj atestantoj. Pri patrino Tereza, pri Albert Schweitzer, Dietrich Bonhoeffer, Sankta Francisko, Adolf Burkhardt, Henriko Paruzel kaj aliaj.

Bona Dio, mi dankas al Vi, ke ni povis loĝi ĉi tie sub gastama tegmento, kie tiom da bonaj homoj elstare zorgis pri ni.

Bona Dio, mi dankas al Vi, ke tiom ofte ni povis komune preĝi en tiom da divers-konfesiaj preĝejoj de la urbo.

Bona Dio, mi dankas al Vi, ke ni renkontiĝis kun multaj gefratoj, kun kiuj ni dialogis, diskutis, ridis kaj certe ankaŭ ploris.

Bona Dio, mi dankas al Vi pro la bona vetero kaj ke de tempo al tempo Vi permesis al la ĉielo modere plori ĝojolarmojn. Ni dankas ankaŭ pro la sukcesa tuttaga ekskurso.

Bona Dio, mi dankas al Vi, ke ni ekumene kongresis en unu domo, sed ni forte bedaŭras, ke Vi ne sukcesis dividitajn Viajn gefilojn amatajn kolekti ĉirkaŭ unu nedividita tablo, al kiu Vi kiel gastiganto ŝategis nin ĉiujn inviti.

Pardonu al ni, ke ni tiom malobeas al Via plej profunda kordeziro, ke ni estu unu, kiel Vi estas unu kun Via Filo, kaj Via Filo kun Vi. Donu al ni esperon fari pliajn paŝojn al unueco en la apuda estonteco.



# MIA DEZIRO

**Mia deziro por vi estas:**
**ke vi daŭre konservu**
**en koro la oran rememoron**
**pri ĉiu riĉa tago**
**kiun vi konis;**
**ke vi estu kuraĝa**
**en la horo de provado;**
**kaj forta kiam metiĝos**
**kruco sur viajn ŝultrojn,**
**kiam la monto surgrimpenda**
**ŝajnas tro alta al vi**
**kaj la vojsignoj de espero**
**tre malproksimas.**

**Mia deziro por vi estas:**
**ke ĉiu donaco flanke de Dio**
**dum la jaroj kreskadu**
**kaj plenigu la korojn**
**de ĉiuj kiujn vi amas**
**per granda amo.**

**Mia deziro por vi estas:**
**ke ĉiun horon de la tago**
**anoncu sin amiko aŭ amikino**
**kiu indas vian amikecon,**
**je kiu plene fidi vi povas,**
**kiam trafos vin problemoj,**
**kun kiuj vi spitos torentojn**
**kaj atingos montosuprojn.**

**Ke en tagoj de ĝojo kaj sufero**
**la rideto de kara Jesuo**
**alportu al vi pacon**
**kiu apudigu vin al Dio.**

**El tanzania preĝlibro**
**tradukis Jacques Tuinder**